

**“To be or not to be” from the play *Hamlet* by William Shakespeare in Esperanto**

HAMLETO

Ĉu esti aŭ ne esti, — tiel staras	
Nun la demando : ĉu pli noble estas	60
Elporti ĉiujn batojn, ĉiujn sagojn	
De la kolera sorto, aŭ sin armi	
Kontraŭ la tuta maro da mizeroj	
Kaj per la kontraŭstaro ilin fini ?	
Formorti — dormi, kaj nenio plu !	65
Kaj scii, ke la dormo tute finis	
Doloron de la koro, la mil batojn,	
Heredon de la korpo, — tio estas	
Tre dezirinda celo. Morti — dormi —	
Trankvile dormi ! Jes sed ankaŭ sonĝi !	70
Jen estas la barilo ! Kiaj sonĝoj	
Viziti povas nian mortan dormon	
Post la forĵeto de la teraj zorgoj, —	
Jen tio nin haltigas ; tio faras,	
Ke la mizeroj teraj longe daŭras :	75
Alie kiu volus elportadi	
La mokon kaj la batojn de la tempo,	
La premon de l' potencaj, la ofendojn	
De la fieraj, falson de la juĝoj,	
Turmentojn de la amo rifuzita,	80
La malestimon, kiun seninduloj	
Regalas al merito efektiva, —	
Jes, kiu volus tion ĉi elporti,	
Se mem, per unu puŝo de ponardo,	
Lj povus sin de ĉio liberigi ?	85
Kaj kiu do en ŝvito kaj en ĝemoj	
La ŝarĝon de la vivo volus porti,	
Se ne la tim' de io post la morto,	
De tiu nekonata land', el kiu	
Neniu plu revenas. Kaj pro tio	90
Plivolas ni elporti ĉion teran,	
Oj flugi al mizeroj nekonataj.	
La konscienco faras nin timuloj ;	
Al la koloro hela de decido	
Aliĝas la paleco de l' pensado ;	95
Kaj plej kuraĝa, forta entrepreno	
Per tiu kaŭzo haltas sendecide,	
Kaj ĉio restas penso, sed ne faro...	
Sed haltu ! Ha, la ĉarma Ofelio...	
(Al Ofelio) Ho, nimfo, prenu ĉiujn miajn pekojn	100
En vian puran preĝon !	